**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 47

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Konscienco senmakula estas **k ␣ s ␣ n ␣** plej mola.

**2.** Pri Sovetio memorigas la sloganoj kiuj ankoraŭ konserviĝis sur kelkaj domoj proksime al la ĉefaj stratoj kaj ankaŭ la **klasika ␣ t ␣ t ␣ ␣** de Lenino en la ĉefa placo.

**3. K ␣ nt␣ nt ␣ ␣ ␣** lidojn eblos ŝanĝi al eŭroj dum ses monatoj ekde la oficiala dato de ĝia funkciigo en ĉiuj bankoj kaj poŝtejoj; en la centra litova banko eblos sen limdato.

**4.** Mi kaj Mentezufis estis atestantoj de la drinkulaj festenoj, dum kiuj la kronprinco, jam duone freneza, **␣ l ␣ sf ␣ m ␣ ␣** kontraŭ la dioj kaj ofendis la pastrojn.

**5.** Mi volonte aŭdos pri ĉiuspecaj sciencaj verkoj, aŭ nur fakaj artikoloj en seriozaj (ne **␣ ␣ lv ␣ rd ␣ ␣**) ĵurnaloj.

**6.** La betula arbareto **l ␣ v ␣ r ␣ ␣** hejtan materialon en vintro kaj belajn promenojn en somero.

**7.** Cameron informis, ke Britio ĉiam subtenos la sekurecon kaj **␣ r ␣ sp ␣ r ␣ ␣** de siaj transmaraj teritorioj.

**8.** Sistemoj, kiuj helpas retrovi rabitan ŝipon funkcias per GPS (globa pozicia sistemo), kiu per **k ␣ mb ␣ n ␣** de signaloj de pluraj satelitoj ekzakte kalkulas la pozicion de la ŝipo.

**9.** Lanti, en Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) provis enkonduki alian, preskaŭ **␣ ␣ r ␣ l ␣ l ␣ ␣** al la Zamenhofa homaranismo, ideologion, la sennaciismon.

**10.** Libroj, kuŝantaj sur la planko kaj fenestrobreto, memorigis al li **␣ ␣ s ␣ ĝ ␣ r ␣ ␣ ␣**, kiuj longe atendis surstrate taŭgan tramon, kaj kiuj impete rapidis okupi siajn lokojn.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** La skatolo estis 66 cm alta **k ␣ b ␣** kaj en ĝi troviĝis kvar malgrandaj skatoloj.

**2.** Protagonistoj de kapitalismo sugestiis, ke ĉiu povos fariĝi milionulo; li nur devas aĉeti akciojn kaj spekuladi ĉe **b ␣ rs␣ ␣**.

**3.** Mi ankaŭ aĉetis en Memfiso sepobrakan kandelingon kaj **v␣ ks ␣ ␣ ␣** kandelojn – la vespermanĝo estos pli bona ol ĉe la sinjoro Ĥaires mem.

**4.** Kara sinjoro, ĉu vi povus alporti al mi el la proksima butiketo lakton kaj **b ␣ lk ␣ ␣ ␣** por mia infano?

**5.** Sherlock Holmes estis iom **d ␣ nd ␣** karaktero, spertulo en abunde da fakoj, droguzanto (nuntempe absolute ne politike korekta), kaj amiko de Doktoro Watson.

**6.** 19a Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto, la plej grava **e** ␣ ␣ **nt** ␣ de Esperanto en Aŭstralio, altiris preskaŭ 80 personojn por lerni, gvidi kaj ĝui la atmosferon de Esperantujo.

**7.** Katja kolektis el sia korbo la lastajn pecetojn de blanka pano kaj ĵetis ilin al malgranda familio de **p** ␣ **s** ␣ **r** ␣ ␣, kiu kun sia timema braveco, saltis kaj pepis tuj ĉe ŝiaj piedoj.

**8.** Kaj estas tie plata roka monteto, fendiĝinta dum la krucumo de Kristo, ĝi nomiĝas **I** ␣ **f** ␣ **r** ␣, ĝi situas apud la urbomurego, je ŝtonĵeta distanco.

**9.** Sovetio elspezis gigantajn sumojn por armeo kaj atom-arsenalo, tiu ĉi **k** ␣ **ĉ** ␣ da problemoj, mankoj kaj absurdaĵoj fine kondukis al pereo de la ŝtatkapitalisma lando.

**10.** La scienco kaj arto evoluas ĝuste dum la unua postmilita periodo, la milito ilin renovigas, refreŝigas, vekas – ĝi firmigas la **m** ␣ **ns** ␣ ␣ kaj spronas.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

tumult', tekst', parlament', grat', katalog', digest', revizi', aflikt', imun', palpebr'.

**1.** La grandegulo ␣ ␣ **l** ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **m** ␣ ␣ blindigita de la lumo; post momento li iris sur la mezon de l' areno kaj rigardis ĉirkaŭe, kvazaŭ volante ekscii, kontraŭ kio li devos batali.

**2.** En Nord-Irlando estas enkondukitaj novaj iniciatoj, inter aliaj, forigo de la postulo, ke ĉiuj nordirlandaj ␣ ␣ ␣ **l** ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **n** ␣ ␣ kaj publikaj funkciuloj ĵuru fidelecon al brita monarĥo.

**3.** Ju pli estas uzataj moneroj faritaj el latuno, des pli similaj al la aŭtentikaj moneroj ili fariĝas, ĉar neeviteble ili akiras la ␣ **r** ␣ ␣ ␣ **ĵ** ␣ ␣ ␣ kaj malpuraĵojn de konstanta manŝanĝo.

**4.** La patro de Eminjo perdis sian oficon, kaj de ␣ ␣ ␣ ␣ **k** ␣ ␣ **ĝ** ␣ li malsaniĝis, ĝis nun ankoraŭ li kuŝas en la lito, la kompatindulo, nek vivanta, nek mortinta.

**5.** *Holi*, la barata festo de koloroj, kiu markas la finon de la vintro, estis kvieta, malĝoja afero ĉi-jare pro lastatempaj ␣ ␣ **m** ␣ ␣ ␣ ␣ **g** ␣ ␣ inter hinduoj kaj islamanoj en la okcidenta subŝtato de Gujarat.

**6.** Politikistoj beligas la sistemon per tiel nomataj vakaj, kosmetikaj reformoj, igante ĝin politike pli ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **t** ␣ ␣ **l** ␣, por tiel mutigi la koleron de la publiko.

**7.** La studentoj ĉiutage eltrinkis tri samovarojn, sed la ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **g** ␣ **d** ␣ progresis malrapide, kaj je la tridek-unua de aŭgusto estis registritaj nur tridek tri mil titoloj.

**8.** Intertempe ni havas tiom da redaktoroj kaj ␣ ␣**v**␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **t** ␣ ␣, ke foje mi perdas la superrigardon.

**9.** La ekzisto de grandaj ␣ ␣ **k** ␣ ␣ ␣ **r** ␣ ␣, ekz. en Interreto, kaj la ekzisto de komputilaj vortaroj kaj gramatikoj verŝajne ŝanĝos la metodon por multaj lingvosciencistoj.

**10.** La parlamento, estrata de socialistoj kaj ties alianculoj, pro falsaj pretekstoj senigis Hajdari-n, la unuan gvidanton de la Demokrata Partio, de lia deputita ␣ **m** ␣ ␣ ␣ **c** ␣.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** Jam la sekvan someron konstruaĵo en formo de pagodo videblis en nia ĝardeno, ĝi estis konstruita el krudaj ___ stangoj, kaj la plantoj baldaŭ kovris ilin.

**a.** akcentaj **b.** piceaj **c.** fabaj **d.** humanaj

**2.** Grandan sumon, 35.000 eŭroj, oni planas uzi por la unuaj ses monatoj de la ___ Interreta Televido.

**a.** ekvatoro **b.** tramo **c.** projekto **d.** statuo

**3.** La loknomo de Minamata, samkiel Hiroŝima, Nagasaki kaj Fukuŝima, rememorigas al la homaro ___, kruelecon, misuzon de teknologio kaj homan arogantecon.

**a.** tragedion **b.** eklezion **c.** planedon **d.** vegetalon

**4.** La registaro baldaŭ proponos, ke eksterlandaj ___ de homokomerco povu ricevi protekton kaj provizoran restadpermeson en Svedio, se ili pretas helpi al la polico.

**a.** veluroj **b.** staturoj **c.** viktimoj **d.** adverboj

**5.** La urso origine timas la homon, sed ___ renkontiĝoj igas ursojn ataki homojn.

**a.** abruptaj **b.** ajlaj **c.** validaj **d.** subjektaj

**6.** Proksime de la kameneto, sub ŝirmo de verda ekrano, staris tablo kun ___ servico kaj kun restaĵoj de videble ĵus manĝitaj frandaĵoj.

**a.** ligna **b.** tumulta **c.** ŝaŭma **d.** porcelana

**7.** Arĝentajn kaj orajn vazojn ŝi alportis en la domon; germana biero kuŝis en la kelo; nigraj fajraj ĉevaloj ___ en la stalo; granda riĉeco montriĝis ĉie en la kastelo.

**a.** blekis **b.** enketis **c.** indulgis **d.** deĵoris

**8.** La lipoj de Marta iom tremis, sur ŝia vizaĝo flamanta ruĝo ___ kun paleco.

**a.** ekspoziciis **b.** jukis **c.** alternis **d.** sopiris

**9.** En la kelo araneoj ___ densan araneaĵon kaj ĉirkaŭvolvis la muŝojn.

**a.** interpretis **b.** ŝpinis **c.** kalumniis **d.** klopodis

**10.** Oni ___ la grafinon, sed ŝi ne volis edziniĝi, sentante, ke ŝia vivo kun la homoj de laboro, estos malfacila por ŝi, dorlotita de la nobela vivo.

**a.** jungis **b.** propagandis **c.** kombinis **d.** svatis